

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 68, januaro-februaro 2024



Universala Esperanto-Asocio

Kunvenoj en Tanzanio kaj Burundo pretigas la kongreson de 2024 en Afriko

Planoj por la venonta Universala Kongreso de Esperanto, okazonta komence de aŭgusto 2024 en Aruŝo, Tanzanio, signife antaŭenpaŝis en du lastatempaj kunvenoj. Tritaga seminario en la Internacia Konferenca Centro de Aruŝo de 5 ĝis 7 januaro kunvenigis 31 Esperanto-organizantojn el Tanzanio, Burundo, Kenjo kaj la Demokratia Respubliko Kongo, kune kun fakuloj el Germanio por tri tagoj da planado. La seminario rezultigis, inter aliaj konkretaj rezultoj, starigon de loka organizo en Aruŝo mem.

Tiu kunveno sekvis seminarion en Rumonge, Burundo, de 23 ĝis 27 decembro, pri teknologio kaj edukado, gvidatan en Esperanto kun specialistoj el eŭropaj kaj afrikaj landoj, ĉefe Burundo mem. La seminario estis la 107-a en la daŭra serio de trejnadaĵ seminarioj en diversaj partoj de la mondo. En la jaro 2023 tiaj seminarioj okazis en Brazilo, Burundo, Ĉeĥio, Hungario, Italio, Kroatio, Latvio kaj Togolando; por 2024 oni planas seminariojn en Albanio, Armenio, Brazilo, Ĉinio, Francio, Kroatio, Kubo, Pollando kaj Tanzanio.

Multlingva edukado estas esenca, UEA deklaras



“Edukado kaj la transdono de scio riĉigas la homan socion laŭ amaso da manieroj, ekde individua bonfarto kaj civitaneco, ĝis ekonomia kresko, redukto de malegaleco kaj socia unuiĝo,” laŭ la mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Edukado, 24 januaro 2024.

Atentigante, ke la temo de Unesko por 2024 estas “Edukado por Daŭra Paco”, la mesaĝo de UEA emfazas, ke edukado “estas homa rajto kaj publika respondeco.” Bona edukado “disvolvas sciojn, kaj kultivas en la lernantoj valorojn, sintenojn, kapablojn kaj kondutojn por fariĝi pacaj agantoj en siaj komunumoj. Daŭra paco bezonas realigon de homaj rajtoj, demokratian regadon, dialogon, solidarecon kaj kunlaboron.”

La mesaĝo de UEA substrekas, ke “Por plena realigo de tiuj celoj, plurlingva edukado estas esenca: alfabetigo en la gepatra lingvo, profundigo kaj regula uzo de pluraj lingvoj, inkluzive de tiuj regule uzataj en la koncerna lando, ĉiutaga uzo de malsamaj lingvoj, interkultura interkompreniĝo per internacie konataj lingvoj, kaj lernado tra la tuta vivo. Multlingvismo grave kontribuas al internacia konscio, kaj al lernado de la arto kaj scienco de homa kunvivado.”

En mondo ĉiam pli disdividita, trovi vojojn al transpontado de lingvoj kaj respektado al diverseco estas ĉiam pli grave, UEA asertas. En sia mesaĝo, UEA emfazas la valoron de la Internacia Lingvo Esperanto, sed, ĉefe, ĝi alvokas al ĉiuj ajn metodoj por transiri lingvajn barojn kaj redukti maljustan diskriminacion surbaze de la lingvoj kiujn la homoj parolas.

Hungario: Impona Esperanto-historio

Ceremonio en Mosonmagyaróvár, Hungario, en novembro 2023 markis la centjariĝon de la morto de la Espeeranto-pioniro Sándor Giesswein, prezidanto (1911-1923) de la Hungara Esperanto-Societo, parlamentano, kaj unu el la fondintoj de la kultura movado kiu kondukis al la ekevoluo de la hungara skolo de verkistoj, inter ili Kálmán Kalocsay kaj Gyula Baghy, dominaj figuroj en la Esperanto-literaturo de la 1920aj kaj 1930aj jaroj. En siaj rimarkoj je tiu okazo, István Szabolcs, iama prezidanto de la Hungara Espereanto-Asocio, emfazis la pledadon de Giesswein por fremdlingva lernado kaj por Esperanto kiel aparta aliancaĵo de malgrandaj kaj lingve izolitaj nacioj.

<https://esperantohea.hu/aleksandro-giesswein-100a-datreveno/>

La jaro 2024 markas ankaŭ la centjariĝon de la naskiĝo de István Szerdahelyi, profesoro de Esperanto en la Universitato Eötvös Loránd, Budapeŝto, inter la fondintoj de la moderna studkampoj esperantologio.

Ĉinio: Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko festis dek jarojn

La prezidanto de UEA prof. Duncan Charters estis ĉefparolanto en la dekjariĝa festo de la Internacia Esperanto-Muzeo en la Universitato Zaozhuang, Ĉinio, en decembro. La muzeo kaj biblioteko konsistigas unu el la plej kompletaj kolektoj de Esperanto-materialoj en Orienta Azio, kune kun la kolekto de la Japana Esperanto-Instituto, en Tokio. La vizito de d-ro Charters al Ĉinio inkluzivis ankaŭ diskutojn kun la aliĝinta landa asocio de UEA, la Ĉina Esperanto-Ligo, eldonanto de la Esperanto-eldono de la *Kuriero de Unesko* kaj gastiginto de du Universalaj Kongresoj de Esperanto, en 1986 kaj 2004.

La plej granda Esperanto-kolektoj en la mondo troviĝas en la naciaj bibliotekoj de Aŭstrio (Vieno) kaj Pollando (Varsovio). La kolekto en Varsovio, la Biblioteko Hodler de Universala Esperanto-Asocio, estas nun malferma al la publiko kaj facile alirebla – signifa plibonigo post ties relativa nealireblo en la sidejo de UEA en Nederlando.

Neniam plu: Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Memoro de la Viktimoj de la Holokaŭsto

Ĉiujare, la 27-a de januaro estas rekonata tra la mondo kiel Holokaŭsta Memortago, memorigata de Unuiĝintaj Nacioj kiel tago de speciala observo. Universala Esperanto-Asocio ligiĝas kun Unuiĝintaj Nacioj en notado de tiu memortago kaj funebrado de la viktimoj de la Holokaŭsto. Ĉirkaŭ ses milionoj da judoj, ĝis duonmiliono de romaoj, kaj enormaj nombroj da handikapitoj, tielnomataj degeneruloj, militkaptitoj, kaj diversaj etnaj kaj religiaj grupoj estis sisteme murdataj pro nesciencaj kaj atavistaj teorioj false bazitaj je heredo sed efektive naskitaj de malamo.

Inter la multaj viktimoj estis preskaŭ la tuta familio de L.L. Zamenhof, la fondinto de Esperanto. Nur unu nepo transvivis. En la unua kongreso de parolantoj de la internacia Lingvo Esperanto, en Francio en 1905, Zamenhof deklaris: “Hodiaŭ ne kunvenas francoj *kun* angloj aŭ rusoj *kun* poloj, *sed homoj kun homoj*.” Tra sia tuta vivo, Zamenhof kredis je la baza homeco de ĉiuj personoj, sendepende de iliaj originoj aŭ deveno. Estis tiu principo – ke ni ĉiuj estas homoj, meritaj je digno, meritaj je valorigo pro nia homeco, meritaj kunvivi harmonie kun aliaj homoj – kiu perdiĝis en la tragedio de la Holokaŭsto.

Ni, anoj de la Esperanto-movado, parolantoj de komuna lingvo el ĉiuj partoj de la mondo, funebras tiujn kiuj mortis, kaj ni promesas praktiki tiun humanecon, tiun respekton por ĉiuj homoj, kiu perdiĝis en tiu tragedio de la dudeka jarcento kaj kiu hantas homajn rilatojn eĉ ĝis hodiaŭ. “Neniam plu”, ni deklaras. Sed deklaroj eble ne sufiĉas: trovi la homecon en ĉiuj homaj estuloj devas fariĝi fundamenta principo se ni entute deziras superi la defiojn kiujn la homaro hodiaŭ frontas. Ni devas labori, konversacii kaj rezoni kune, se ni deziras, ke la homaro pluvivu kaj prosperu.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.